

## Kontribuo en „esperanto“ por „Afriko brilas“

### Agado Per-Esperanto por subteni daŭripovan evoluon ek-e en Tanzanio

UN lanĉis la 17 novajn evoluo-celojn. La Esperanto-Movado pretas kunlabori rilate daŭripovon:

- unue agadi Por-Esperanto en evoluiĝantaj landoj;
- due agadi Per-Esperanto subteni evoluon ĝenerale.

Dank' al la bone evoluiĝanta Esperanto-movado en Afriko paralele kreskas la interkompreniĝo.

Kulturo estas ne-disigebla de la ĉiutaga viv-situacio. Do, ankaŭ la problemoj de niaj afrikaj samideanoj montriĝas; kaj aŭtomate kreiĝas kaj multiĝas helpodeziroj. Por helpi efike indas elekti la plej taŭgajn projektojn. Unuflanke surloke en evoluiĝintaj landoj bezonatas esperantistoj spertaj pri racia evoluiĝo.

Aliflanke necesas organiza subteno flanke de UEA kaj SAT kaj de naciaj Esperanto-organizaĵoj tiel ke la financaj subtenoj povus esti kolektataj pli efike kaj regule, subtenante la agadon de unuopaj grupoj aŭ personoj:

1. Formalaj donaco-kvitancoj por la financ-oficejoj de unuopaj ŝtatoj, tiel ke donacantoj povas redukti sian imposto-pagon, kio ĉefe gravas se firmaoj aŭ aliaj fondusoj donacas. Formala donackvitanco ja estas agnoskata internacie ene de EU. Sed prefere necesus subteno flanke de la naciaj Esperanto-organizaĵoj.

2. Inform-kolekto pri kvalito de tiaj projektoj; unue kiel datum-bazo kaj due indus havi konfirmon de neŭtrala persono pri la faritaj projektoj malgraŭ tio ke kompleta garantio ne eblas.

La projektaro „**Mazingira**“ en nord-okcidenta Tanzanio estas unu el la ekzemplodonaj projektoj. Mramba Simba estas la surloka partnero, kiu avantaĝe estras la vilaĝaron Ketare, distrikto Bunda. Dank' al liaj kontaktoj li ricevas subtenon el pluraj eŭropaj landoj. AVE (Asocio de Verduloj Esperantistaj, kunlaboranta fakasocio de UEA pri Ekologio) kunlaboras ekde 2006 kun Mramba kaj kun aliaj grupoj da esperantistoj kaj eĉ ne-esperantistaj grupoj en pluraj eŭropaj landoj ĉefe el Francio, Belgio kaj Nederlando subtenadi unuopajn projektojn de Mazingira.

Ĉar ĝis nun mankas tia organiza subteno flanke de la germana Esperanto Asocio, AVE serĉis kaj feliĉe trovis german-lingvan fonduson kun kiu ni bone kunlaboras. Tamen ni preferus Esperanto-asocion aŭ -fonduson ankaŭ por eviti tradukadojn..

„**Mazingira**“ (vilaĝaro Ketare/Marambeka en nord-okcidenta Tanzanio proksime de Bunda), surloke

organizita de esperantisto Mramba Simba; kunlaboro kun AVE ekde 2006, kaj kun aliaj europaj grupoj:

- putoj por trinkakvo;
- pluvakvo-baseno por bestoj kaj akvumi la ĝardenojn (unua en 2016/17);
- lernej-kostoj por orfoj, por materialo kaj „uniformo“ - tie ni kunlaboras kun germana lernejo, kies lernantoj tiamaniere lernas pri la vivo es afrika kampara regiono;
- konstruado de dua mez-lernejo "Esperanto Secondary School" en Marambeka (ESS);
- agrikulturo, sunflora oleo, kaj rearbarigo;
- operacioj de kriplitaj infanoj, ofte pro vakcinado kontraŭ malario;
- regajneblaj energioj (fotovoltaiko, sun-kuirforno).

**Mazingira-Projekto 2017: gastigejo por lernantinoj** en ESS Marambeka, ĉar kelkaj junulinoj estis perfortitaj sur la longa vojo (ĝis 10 km). Grandan gastigejon por 80 lernantinoj financis la nederlanda fondaĵo Wilde Gansen! ĉar tio ne sufiĉas ni subtenis dometon por 24. Krome necesas domo por manĝejo kaj lerno-ĉambro. Ili loĝos tie ĝis la ferioj, ricevos nutraĵon de gepatroj. Ni kolektis pli ol 6 mil Euro, i.i. 5 mil de „Cents-for-help“ de kunlaborantoj de germana firmao Bosch (dank' al organiza subteno de Bosch-kunlaboranto Janek ).

Aliaj projektoj estas en D.R. Kongo:

- Akvo por Kalima (konstruado de akvoprovizo)
- Rearbarigo en Uvira (komencinta projekto)

**Mi petas vin subteni la Per-Esperanto-Agadon laŭ viaj eblecoj. UEA-Konto de AVE: avex-z** (menciu la projekton).

**Alternative en EU – por pli altaj subtenoj:**

Stiftung-Bruecke.de , Ernst-Barlach-Str. 45, 79312 Emmendingen, Bank für Sozialwirtschaft, IBAN : DE12 1002 0500 0003 2474 04, BIC : BFSWDE33BER

Bonvolu mencii la projekton ; kaj ankaŭ vian adreson se vi ŝatas ricevi kvitancon.

Sur la retejo de AVE troviĝas la raporto de nia agado:

**Koran Dankon !  
D-ro Manfred Westermayer  
(Asocio de Verduloj Esperantistaj)**

Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen, Germanio  
e-mail : manfred@westermayer.de  
AVE: [www.verduloj.org/afriko.htm](http://www.verduloj.org/afriko.htm)